65-a jaro n-ro 186 2024:2

# la lampiro



## La adiaŭao de fidplena idealisto

## D-ro Osvaldo Pires de Holanda


Quer aprender Esperanto?
PROGRAMO MIA AMIKO
pma.esperanto.org.br

# Enhavo


4 | **Vortoj de la redaktanto**
Iom da malĝojo

5 | **Invite**
Salvador, alloga kongresurbo

6 | **Kino kaj aliaj artoj**
Marina Abramoviĉ

8 | **Ne plu inter ni**
La adiaŭo de fidplena idealisto

10 | **Iom da Filozofio**
Imaga interparolo kun filozofoj

12 | **Mia korto, mia sorto**
Parto 3 - Cirklo de bananujoj

15 | **Iom da poezio**
Ljubov Serduciĉ

16 | **Movado**
Kie estas la paco?

19 | **Por iom pripensi**
La benata akvo

20 | **Recenze**
Eterna furora libro

21 | **Kondolence**
Unu plia membro adiaŭas nin

22 | **Iom da gramatiko**
Lingvaj Respondoj

23 | **El mia ĉiutaga vivo**
Nekonscienca sento

25 | **El mia vidpunkto**
Esperanto estas mia grundo



la lampiro

65-a jaro n-ro 186 2024:2

**Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo**

**Redaktanto**: Paulo Sergio Viana
*(psviana@terra.com.br)*

**Enpaĝigo**: José Roberto Tenório

*La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj artikoloj*

---

**Esperanto-Asocio de San-Paŭlo**
Fondita en la 29-a de marto 1937

**Propra sidejo**
Rua Faustolo, 124 - Água Branca
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo
easp.org.br | contato@easp.org.br

**Estraro**
**Prezidanto**: Esmeraldo A. Alencar de Lima
**Vicprezidantino**: Cristina de Claudia Graaf
**Sekretariino**: Maria Conceição Rodrigues
**Kasisto**: José R. Tenorio da Silvas

**Konsilantaro**
Paulo Sergio Viana
José Mauro Progiante

**Anstataŭanto**
Audino Castelo Branco

---

**Jarkotizo por 2024**

| | |
|---|---|
| Simpla Membro ................. | R$ 200,00 |
| Subtena Membro ............... | R$ 400,00 |
| Ŝtatinterna Membro .......... | R$ 100,00 |

# Iom da malĝojo


Nia nuna numero de La Lampiro enhavas iom da malĝojo. Forpasis du amataj samideanoj, al kiuj ni multe ŝuldas. Ili vigle kaj entuziasme kontribuis al la brazila Esperantomovado, aparte al EASP.

Ili estas Oswaldo Pires de Holanda kaj Etevaldo Pereira, pri kiuj vi povos legi post kelkaj paĝoj. Estas nia devo transformi nian malĝojon en omaĝon, rekonon kaj inspiriĝon.

Nia verda kulturo multe ŝuldas al tiaj homoj, kiuj dediĉas kaj direktas sian energion por nia afero. Ili lasis al ni valorajn instruojn. Ni sciu kompreni ilian valoron kaj klopodu sekvi ilian ekzemplon.

Nia propra uzado kaj kontribuado al la Esperanta kulturo estas la plej alta omaĝo, kiun ni povas fari al ili.

Ni plu tenu la torĉon!



INVITE

# Salvador, alloga kongresurbo

La 58-a Brazila Kongreso de Esperanto okazos inter la 14-a kaj 17-a de novembro 2024, en la alloga urbo Salvador, en ŝtato Bahia.

Kune kun ĉi tiu plej granda Esperanto-evento en nia lando, paralele okazos la 42-a Brazila Esperanto-Junulara Kongreso.

La programo estos diversa kaj riĉa, por ĉiaj gustoj, zorge preparata de la skipo de Brazila Esperanto-Ligo.

Kaj la urbo estas eksterordinare alloga, laŭ kultura kaj turisma aspektoj.

Ĉu vi ĉeestos?

Por pliaj informoj iru al: https://esperanto.org.br/kongreso



# Marina Abramoviĉ

Mi volas paroli pri unu el la plej interesaj artistinoj nuntempe - Marina Abramoviĉ. Ŝi naskiĝis en Beogrado, serba urbo, je la 30-a de novembro 1946. Naskita en familio, kiun ŝi priskribas kiel parton de la "Ruĝa Burĝo". Kelkaj batalis dum la monda milito, kaj post ĝi eĉ gajnis "Ordenon de la Popolaj Herooj" de la registaro.

Ŝi vivis kun geavoj ĝis kiam ŝi sesjariĝis. Ŝia avino estis profunde religia.




Pro tio, Marina trapasis plej grandan parton de sia infaneco sekvante la ritojn de avino. Kiam ŝi sesjariĝis, ŝia frato naskiĝis kaj ŝi ekloĝis kun siaj gepatroj. Tiam ŝi havis lecionojn de piano, angla kaj franca lingvoj. En tiu momento, kvankam ŝi ne studis arton, jam vekiĝis intereso kaj ŝi amegis pentradi.

Vivo en tiu epoko ne estis facila, Marina estis batita de la patrino pro "supozeble esti tro sinmontrema". En intervjuo, ŝi priskribas sian patrinon kiel tro kontroleman pri ŝiaj gefiloj, kvazaŭ militecan. Ĝis atingi 29 jarojn, ŝi ne rajtis reveni hejmen post la deka horo nokte. Kaj kiel oni povas imagi, la rilato inter ŝiaj gepatroj ankaŭ ne estis bona.

Marina studis en la "Akademio de Vidaj Artoj" de Beogrado kaj la postgradiĝon en la Arta Akademio de Zagrebo, kien ŝi poste translokiĝis kaj faris siajn unuajn unuopajn ekspozi-

ciojn. Sekve al la edziniĝo, farinte prezenton en Amsterdamo, ŝi decidis tien translokiĝi en 1976. Poste, ŝi ankaŭ gvidis lecionojn en universitatoj de Francio kaj Germanio.

Sekvis multaj artaj prezentoj ŝiaj, kiuj okazis kutime kun ŝia propra ĉeesto. Unu el la lastaj ĉefaj prezentoj de ŝi estis en Brazilo, en la Muzeo pri Moderna Arto, kies titolo estas "La artisto ĉeestas". Tiam ŝi sidis sur unu seĝo kaj unu post la alia el la publiko sidis je seĝo antaŭ ŝi, kaj estis ia ĉeesta konekto inter ambaŭ dum iom da tempo. Tio kion ŝi ne sciis, estis ke ŝia eksa edzo tiam sidiĝos en la seĝo. Tre emociiga momento por ŝi. Fakte, estis sciencaj studoj kun ŝi pri kiel ŝia cerbo funkcias dum tiaj konektoj, kio estas aparte speciala.

Ĉu vi jam konis pri ŝi? Mi esperas ke vi ĝuis koni iom pli pri tiu aparte speciala artistino. Mi instigas vin serĉi pli pri ŝi kaj speciale tiu prezento ĉe MAM. Ĝis la sekva fojo!

**Anna Lobo de Carvalho**



NE PLU INTER NI

# La adiaŭo de fidplena idealisto


## D-ro Osvaldo Pires de Holanda (1921 - 2024)

Iuj esperantistoj havas talenton por krei projektojn, aliaj por instrui Esperanton, pliaj por diskonigi la lingvon. D-ro Osvaldo Pires de Holanda, aŭ simple Holanda por la konatuloj, apartenis al ĉi lasta grupo. Li parolis ĉu al unuopulo ĉu al aŭskultantaro kun la sama entuziasmo de homo unuafoje enamiĝinta al la afero Esperanto.

Mi konatiĝis kun li en 1996 okaze de vizito al Esperan-ta Klubo Zamenhof (EKZ). Tiu klubo situas en kvartalo de la ĉefurbo San-Paŭlo, nomata São Miguel Paulista, kaj estis kunfondita de li mem en 1949. Kun flugfolio pri Esperanto enmane, mi serĉis informojn pri lecionoj. Lia simpatia akceptemo kuraĝigis min aliĝi al la tiea dimanĉa kurso. De tiam renkonti lin en iu esperanta aranĝo estis ĉiam granda plezuro.




Li naskiĝis en 1921 en Baturité, ŝtato Ceará (Brazilo), kaj venis al San-Paŭlo en 1944, kie li plu studis ĝis abiturientiĝo. En 1961 li ricevis sian unuan universitatan diplomon, pri Ĵurnalismo, kaj en 1971 sian duan diplomon, pri Juro, ofico kiun li plenumis dum 35 jaroj kiel advokato.


La junulo Holanda 27-jara

La unuajn instruojn pri Esperanto li ricevis kiam li ankoraŭ loĝis en sia naskiĝurbo, sed laŭ propra rakonto li efektive eklernis la lingvon survoje al Sanpaŭlo dum la 29-taga veturado per trajno kaj kamiono.

Krom EKZ li kunfondis pliajn tri E-grupojn en la ĉirkaŭaĵoj de la ĉefurbo San-Paŭlo, nome E-Grupo Adolfo Bezerra de Menezes – EGABEM (1982), Esperanto-Grupo Verda Lumo (1993) kaj Pirituba Esperanto-Grupo (1995).

Li aŭtoras naŭ librojn, en la portugala, el kiuj tri estas didiĉitaj al poezio. Krome, li tradukis kvar verkojn al Esperanto: La evangelio de la horo (O evangelho da hora), de Paul Berthelot – 1990; Vivo Feliĉa (Vida Feliz), de Joana de Angelis (Spirito) kaj Divaldo Pereira Franco (mediumo) – 1994 (el tiu traduko aperis en 1998 la hungra versio); Vojoj de la Saĝeco (Caminhos da Sabedoria), de Ubiratã Rosa – 1998; Nova Aŭroro (Alvorada Nova), de Abel Glaser – 2002; Elektitaj Maksimoj kaj Pensoj (Seleções de Máximas e Pensamentos) – 2020.




D-ro Holanda (unua dekstre) kiel prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo (BEL) apud la tiama prezidanto de UEA, d-ro Renato Corsetti, dum la 37-a Brazila Kongreso de Esperanto okazinta en 2001 en la brazila ĉefurbo Braziljo.

Li estis Honora Membro de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (EASP), kaj ties prezidanto inter 1994 – 1995. Li estis prezidanto ankaŭ de Brazila Esperanto-Ligo (BEL) inter la jaroj 1998 – 2001. Kiel prezidanto de BEL li starigis la projekton Historio pri la Esperanta Movado en Brazilo, sed neniu kuraĝis entrepreni la gigantan taskon. Do li mem ekkompilis la materialon kaj ĉirkaŭ kvin jarojn poste li aranĝis la tuton libroforme, sed neniu kuraĝis eldonis la dikan kompilaĵon.




Lasta vizito de Holanda, en 2023, al Esperanta klubo Zamanhof kunfondita de li kaj ankoraŭ funkcianta. Staranta dekstre, la nuna prezidanto de la klubo, Maurício Constantino de Araújo.

Li forpasis la 26-an de marto 2024, 102-jaraĝa, kiel lojala idealisto kaj sincera amiko, lasante du filojn, nepojn kaj sian karan kunulinon Delza.



**José R. Tenorio**




IOM DA FILOZOFIO

# Imaga interparolo kun filozofoj

## TAGMANĜO KUN PITAGORO (iam en la 6-a jarcento a.K.)

*S-ro Pitagoro, dankon pro tio, ke vi permesis al mi viziti vian faman spiritan lernejon, rigardatan kiel la unua universitato en la mondo, ĉi tie en Krotono, sur la itala plandumo... aŭ ĉu mi devus diri sub la itala plandumo...? Ne gravas, nuntempe Krotono ankoraŭ estas greka urbo. Fakte oni povas diri, ke vi estas la unua rektoro en la historio. Vi estas vera saĝulo.*

Se vi estas sciema, vi estas bonvena. Mi fondis ĉi tiun komunumon por viroj kaj virinoj (jes, multaj virinoj studas ĉi tie) amantaj la scion. Neniu el ni estas saĝulo, ni estas nur filozofoj.

*Filozofoj vi estas, certe. Philos = amiko, amanto; sophia = saĝeco, scio. Vi ĉiam diris tion, ke vi estas nur amiko de la scio, do filozofo. Tiu amikeco rezultigis gravajn malkovrojn en pluraj kampoj: matematiko, astronomio, muziko. Gratulon pro via teoremo, ĝi iĝis mondkonata.*

Ĉu vi parolas, pri la rilato inter la lateroj de orta triangulo? Mi ne malkovris tion. Babilonoj, egiptoj kaj eble aliaj popoloj jam konis ĝin. En miaj vojaĝoj kaj kontaktoj kun saĝuloj mi multon lernis kaj decidis disvolvi kun miaj disĉiploj. La ĉefaj objektoj de nia studado estas la nombroj, ĉar ili estas la principo de ĉio. Vidu, kara vizitanto, la kosmo estas regata de matematikaj rilatoj. Nia planedo estas sfero, same kiel aliaj astroj, kaj ilia cirkla movo estigas harmonion, ĉielan muzikon. La muzika harmonio, kiel vi scias, dependas de matematika proporcio inter la notoj.

*Eble vi ne kredos min, S-ro Pitagoro, tamen en mia tempo multego da homoj ne ŝatas la nombrojn, kelkaj eĉ malamas matematikon? Kaj, kvankam vi jam suspektis, ke la tero estas ronda, miloj, eble eĉ milionoj da homoj insistos, ke ĝi estas plata.*

Ĉu? Nekredeble. Tio devigas min repripensi miajn ideojn pri la evoluo de la animo. Konsiderante la metempsikozon kaj tion, kion vi diras al mi pri homoj de fora estonteco, eble estas animoj, kiuj spertas portempan regreson.

Mi vojaĝas multe, ĉar mi estas komercisto kaj scivolema. Egiptio ankoraŭ estas vizitinda lando, kun antikva kaj admirinda kulturo, kie eblas samtempe fari bonajn negocojn, akiri sciojn kaj saĝecon. Fakte mi ne malkovris la altecon de la piramido, mi kalkulis ĝin, simple komparante la ombrojn de la piramido kaj de bastono, kiun mi fiksis apude.

*Kara S-ro Pitagoro, certe vi pravas pri la graveco de akvo, kaj ankaŭ por antaŭvidi la evoluon de viaj ideoj. Mi dankas pro via afableco kaj petas permeson fini ĉi tiun agrablan konversacion. Nun mi antaŭeniros kelkajn jarojn en la tempo por viziti alian gravulon de la filozofio, ankoraŭ apud la malhelbluaj kaj sunumitaj akvoj de la mediteranea maro.*

Ĉi tiu interparolo estis plezuro por mi. Se iam vi diskonigos ĝin al viaj samtempuloj, aldonu almenaŭ du el miaj diraĵoj. Mi proponas la jenajn:

“La plej malfacila afero en la mondo estas koni sin mem kaj la plej facila estas paroli malbone pri la aliaj.”

“Espero estas la sola havaĵo komuna al ĉiuj homoj; tiuj, kiuj havas nenion alian, ankoraŭ ĝin havas.”

*Certe mi faros tion, tiuj opinioj ankoraŭ validas por la homoj de la 21-a jarcento. Ĝis!*

**José Mauro Progiante**







# Parto 3 - Cirklo de bananujoj

Post falĉado kaj purigado de nia nova korto montriĝis ke ĝia tereno estas ne sole dekliva (La Lampiro n-ro 184, pp 16-18), sed ankaŭ mankhava je unu el la bazaj rimedoj de salubrigo, nome tubo-reto por kaptado de grizaj akvoj (uzitaj akvoj el lavkuvo, duŝejo, lavabo kaj lavmaŝino).

Unuamomente mi iom maltrankviliĝis pri tio kion fari por evitigi ke tiaj akvoj, libere fluantaj sur la korton, venigu insektojn kaj estigu malsanojn. Feliĉe ne necesis multe esplori por malkovri ke jam ekzistas diversaj ekologiaj projektoj por trakti tiajn akvojn. La plej simpla kaj malmultekosta el tiuj salubrigo-sistemoj, celantaj montarajn regionojn kiaj la nia, estas la tiel nomata cirklo de bananujoj.

La cirklo de bananujoj estas simpla kaj efika sistemo por traktado de grizaj akvoj, ĉar per ĝi oni povas fari grizajn akvojn reuzeblaj kaj samtempe aliigi organikan materialon, per senaera malkomponiĝo, al kompoŝto kiun la bananarboj sorbas per la radikoj kune kun la akvo. Tra siaj longaj kaj larĝaj folioj bananujoj elvaporigas ian gran-



Supre: antaŭe la grizaj akvoj fluadis libere sur la korton.

Flanke: post interveno, la grizaj akvoj ekfluadis rekte en la cirklon de bananujoj.



dan kvanton da akvo, mezume inter 15 kaj 80 litrojn ĉiutage depende de la loko kaj klimato.

Pretigi cirklon de bananujoj estas simpla laboro plenumebla en kelkaj paŝoj:

- fosu kavaĵon, laŭ konko-formo, mezurantan ĉirkaŭ 1m larĝa, 1m longa kaj 1m alta, alidire, 1m$^3$;
- aranĝu la elfositan teron ĉirkaŭ la bordoj de la kavo kiel barilon por malhelpi la eniron de pluvakvo;
- plenigu la kavon per lignaj trunkoj unuatavole en la fundo, per maldikaj arbobranĉoj duatavole, kaj triatavole per sekfolioj kaj pajl(tig)oj, tiel ke nek lumo nek akvopluvo eniru;
- direktu la tubo-reton de la domaj grizaj akvoj ĝis la kavo;
- Ĉirkaŭ la bordoj de la kavo plantu kvar bananujojn. Inter la bananujoj oni povas kreskigi aliajn plantojn kun larĝaj folioj kiaj taroj.


Notindas ke la cirklo de bananujoj ne taŭgas por traktado de nigraj akvoj (tiuj el la fekujo). Tiucele oni uzas alian ekologian sistemon de salubrigo. Eventuala temo por estonta artikolo.



Post ĉirkaŭ unu jaro da funkciado, la cirklo da bananujo estis garnita per barilo el bambuo por malhelpi la eniron de kortobestoj (kokinoj, katoj, hundo, kuniklo k.a.).

Nia cirklo de bananujoj bone funkcias jam de pli ol unu jaro. Estas ĝojige vidi ke per simpla solvo oni povas plibonigi la ĉirkaŭan medion cele al pli sana vivo. Kaj la bona novaĵo: post unu-du monatoj ni povos rikolti la unuajn tri bananarojn el nia cirklo de bananujoj.

→




1. Kavo mezuranta ĉirkaŭ 1m larĝa kaj 1m alta sufiĉas por domo kun kvar personoj.
2. Ujo por reteno de graso kaj oleo.
3. Fluado de grizaj akvoj tra tubo de 100mm rekte en la cirklon de bananujoj.
4. Unua tavolo da organika materialo (arbotrunkoj kaj dikaj branĉoj) aŭ mineraloj (ŝtonetoj kaj gruzoj). Laŭgrade kiel la centra materialo malkomponiĝas la nivelo de la organika amaso malaltiĝas kaj pliaj materialoj povas esti aldonitaj.
5. La lasta tavolo da organika materialo – konsistanta el branĉetoj, tigoj, pajlo kaj sekfolioj – malhepas la eniron de pluvakvo.
6. Inter la bananujoj oni povas planti aliajn foliplatajn kreskaĵojn, kiaj taroj.
7. La elfosita tero aranĝita kiel barilo por evitigi eniron de pluvakvo
8. La problemo fariĝas solvo: la malpura akvo aliiĝas al kompoŝto, kiu sterkas la bananujojn, kiuj produktas nutraĵon.

**José R. Tenório**



# Ljubov Serducic̑



***Ljubov Serdunic̑*** *estas nuntempa ukraina verkistino, poetino, esploristino de popola kulturo. Ŝiaj verkoj estas publikigitaj en revuoj kaj gazetoj en Ukrainio kaj eksterlande (tradukitaj al la angla, franca, belorusa kaj rusa lingvoj). Gajninto kaj laŭreato de multaj literaturaj konkursoj kaj premioj. La aŭtoro de 26 libroj de diversaj ĝenroj por infanoj kaj plenkreskuloj.*



Ljubov Serducic̑

## NI BRODADAS HISTORION DE L' NACIO

Ukraina brodaĵo estas genetika kodo de la popolo, saĝeco de generacioj, simbola mesaĝo de pragepatroj al la estonteco.

Pentras vigle bluon de l' ĉiel'
Fadeneto tra generacioj –
Triston, ĝojon kun viburna bel' –
Ni brodadas historion de l' nacio.

Rakontadas la brodaĵ' pri ni,
Pri feliĉo kaj malharmonio.
Tial do diverse kun pasi'
Ni brodadas historion de l' nacio.

Tio estas al futur' mesaĝ',
Donacego el pase' eterna.
Kaj kreiĝas per la kod' brodaĵ',
Kaj brodiĝas per simboloj viv' moderna.

*Elukrainigis* ***Petro Palivoda***

# Kie estas la paco?

Ĉi-jare nia Esperanto-grupo, ĉi tie en Pasárgada, decidis organizi pli intensan disvastigadon de Esperanto en nia urbo. La strategio decidita estis verki pli da artikoloj por nia urba gazeto, por informi kaj ankaŭ kun la celo krei novajn kursojn de esperanto. Oni pensis ankaŭ pri monata renkontiĝo kun ampleksaj kaj malfermitaj temoj pri aktualaj problemoj en nia socio. Por ĉi-lasta, oni sukcesis partnerecon ĉe la urbodomo, kiu permesis la uzadon de siaj lokaj prelegejoj, unufoje monate, je minimuma kosto, ĉar nia klubo estas neprofitcela organizo.

La ideo de la urbodomo estis okazigi diversajn eventojn ĉe malsamaj partoj de la urbo, koncentrante la propagandon de la evento en la regiono por altiri homojn el kvartaloj proksimaj al la eventa loko. La unua renkontiĝo, konsiderante la nun okazantajn militojn en nia mondo, havis kiel temon: La Paco! Ĉar ĝi estas tre necesa en nia tempo.

La unua evento, estis kunordigita de samideano Blanketo, kaj ĝi okazis en la lasta sabato de la monato, posttagmeze, kaj estis tre bone akceptita de la loĝantoj en la komunumo. Al ĝi venis gejunuloj el la du proksimaj lernejoj, kaj multaj aliaj personoj. Ili ĉiuj Interesitaj pri la debato kaj scivolemaj pri Esperanto.

Post prezentado de la celo de la projekto kaj pri la lingvo kreita de Zamenhof, Blanketo do komencis, kaj per la demando: “Kial estas tiel malfacile kunvivadi pace en nia socio? Li instigis la partoprenadon de ĉiuj. Rapida silento, kaj tuj respondis sinjorino, ridetante: Ni ĉiuj jam scias, ke militoj, terorismo, religia maltoleremo, rasa kaj socia diskriminacio estas kelkaj el la problemoj, kiuj influas nian socion hodiaŭ kaj ne permesas al ni kunvivadi pace.  Post tio, larĝa debato malfermiĝis. Ĉiuj volis opinii.

Blanketo, post pluraj paroladoj, resumis la prezentitajn ideojn, kaj

atentigis pri grava, urĝa kaj necesa ago: Edukado por paco! Ni ĉiuj konsentis, ke la kulturo por paco povas esti prilaborita en lernejoj per la inkludo de temoj, kiel ekzemple, homaj rajtoj, civitaneco, kultura diverseco kaj paca konfliktosolvado. Krom realigi agadojn, kiuj instigas kunlaboron kaj solidarecon inter studentoj. Ĉio kun la celo antaŭenigi valorojn kiel solidareco, empatio kaj respekto por la vivo.

Sed, oni havas alian problemon, – diris serioze iu sinjorino: – Ĉio, kion vi diris estas tre bona sed por estonte. Sed kio pri hodiaŭ, en nia ĉiutaga vivo? Mi vidas homojn agresemajn, irititajn, sen ekvilibro mense por vivi socie. Mi pensas, ke homo, kiu ne havas pacon en sia koro, malfacile kunvivadas pace kun aliaj. Bedaŭrinde, en la realo, ni mem sentas nin foje perditaj kaj, iritite, ni facile kverelas pri senvaloraj aferoj. Kiel sovi tion???

Ĉi tio estas grava punkto. – diris Blanketo. – Kaj kiel ni povus prilabori ĉi tiun internan pacon?

*(Daŭrigota sur la paĝo 18)*



Maljunulo, kun iom da malfacileco por paroli sed kun granda bonvolo, aldonis: – Eble mi povas helpi. En mia vivo mi lernis multon pri nia homa malfortikeco. Tial mi kredas, ke por kunvivadi pace, ni bezonas kompreni aliajn kiel homojn same fragilajn kiel ni mem, kaj tiel scii pardoni ambaŭ, nin mem, kiam ni faras erarojn, kaj ankaŭ la aliajn, kiam ili eraras. Pardono kaj repaciĝo estas gravegaj por konstrui pacon. Sed komprenu bone, ĉi tio ne signifas forgesi la pasintecon, sed vere lerni de ĝi kaj vivi en pli pozitiva maniero.

Vere, estis mirinda renkontiĝo, homoj entusiasme partoprenis kaj ĉiuj estis tre interesitaj; kiel la flegistino, kiu memorigis nin, ke se homo ne sukcesas esti pacema, eble kelkfoje li havas kronikan iritiĝon, kaj la kialo povus esti sanproblemo, ekzemple: hipertiroidismo, malalta nivelo de testosterono, kronika streso kaj multaj aliaj kaŭzoj. En ĉi tiuj kazoj, nur bona volo, meditado, preĝo ne sufiĉas, oni devas serĉi helpon de kuracisto. Vera paco estos atingo venanta el sanaj korpo kaj animo, ŝi diris ridetante. Ĉiuj konsentis, memorante pri la graveco havi sanajn korpon kaj menson por vivi pace kun si mem kaj kun la aliaj.

Je la fino, Blanketo memorigis ĉiujn pri la Esperanto-movado. Ĉar esperantistoj celas kontribui al la akcelo de la paco en la socio per la aprezo de etikaj kaj moralaj principoj, kiuj antaŭenigas respekton al la vivo, homan dignon kaj solidarecon inter individuoj de ĉiuj nacioj. Ekde sia origino Esperanto celis esti pontlingvo inter homoj, respektante la kulturon kaj valorojn de ĉiu loko de nia mondo. Esperantisto laboras por pli bona mondo, pace!

Ne eblas prezenti la tutan rekontiĝon ĉi tie, nur mi povis reliefigi la esencajn punktojn. Kaj inter ili, mi estis tre allogita kiam, je la fino, la homoj ridetantaj, venis por saluti nin, montrante sin feliĉaj, ke ili pli bone komprenis la gravecon de paco en niaj vivoj. Kaj do, vi kara leganto, ĉu vi povas labori por la paco, kun ni? Estu do bonvena, ni laboru kune por la paco.

**David Bianchini**
*davidesperantista@gmail.com*







# La benata akvo

Kia trezoro estas ĝi!

Nia benata akvo, kiu ebligas al ni sensoifiĝi.

Benata akvo, kiun ni uzadas por kuiri.

Benata ĝi estas, ĉar sen ĝi ne eblas bani sin.

Sen akvo, oni ne purigas la domon.



Kiel lavi telerojn, sen akvo?

Kiel lavi vestojn sen ĝi? Eĉ se vi iras al rivero, vi bezonas puran akvon por lavi la vestojn.

Ho! La homoj amas bani sin en la maro, rivero aŭ naĝejo, sed poste ĉiuj bezonas bani sin en pura akvo.

Nuntempe oni sendas la dorlotbestojn al speciala ejo por ke oni banu ilin.

Imagu, kiam viaj preferataj floroj en bedoj velkos pro manko de akvo. Ĉiuj plantoj, arboj, legomoj, verdaĵoj, bestoj bezonas akvon.

Kaj ni senrezerve uzadas ĝin pensante, ke ĝi ĉiam estos abunde je nia dispono.

Tute ne, jen nia devo: bone uzi ĝin respektoplene kaj dankeme, antaŭ ol ĝi finiĝos.

Foje ĝi faladas el la ĉielo abunde kaj subite detruante, kien ajn ĝi iras, eble por montri al ni sian forton. Kiam tio okazas, la homoj eĉ ne havas tempon por sin protekti kaj ne sukcesas kolekti kaj rezervi la trezoron falantan el la ĉielo.

Jen la venĝo de la naturo.... tute ne! Se oni semas pomojn, oni ne rikoltas oranĝojn. Atentu bone pri via semado...

**Maria Cecília Milani**

# Eterne furora libro

En la fascina mondo de literaturo ekzistas pluraj kuriozaj fenomenoj. Unu el ili estas la fakto, ke klasikaĵoj, foje tre antikvaj, konstante reeldoniĝas en multaj lingvoj, kaj konstante furoras antaŭ la publiko. Ekzemploj estas "La Eta Princo", de Saint-Éxupery, kiu ĉiam allogas amasojn da legantoj, kaj "La Mizeruloj", de Hugo, kiu transformiĝis en kinfilmojn.

Plej kurioze estas, ke libro pri filozofio troviĝas ankaŭ kiel ekzemplo de tiuj eternaj furoraĵoj. "Manlibreto", de Epikteto estas unu el tiaj verkoj. Ĝi eldoniĝas, jaro post jaro, en plej diversaj landoj en la mondo. Do, nepre estas havi ĝin ankaŭ en nia lingvo.

Temas pri eta broŝuro enhavanta 53 nelongajn meditaĵojn. Foje ili estas simplaj, memkompreneblaj ideoj, foje pli ellaboritaj meditaĵoj — ĉiam celantaj helpi homojn vivi pli saĝe. Vidu ekzemplon:

"Estas ja karakterize por nefilozofoj neniam serĉi saviĝon aŭ damaĝon en si mem, sed ĉiam serĉi la kaŭzon ekster si. Estas karakterize por filozofo serĉi ĉiun saviĝon kaj damaĝon en si mem."

Foje oni devas relegi tiajn meditaĵojn, kaj estas bona mensa ekzerco klopodi preni praktikajn konsekvencojn aplikeblajn en nia moderna vivo. La ĝenerala ideo, ke mensa trankvileco dependas de nealkroĉiĝo al materiaj aferoj, al aliulaj vidpunktoj, al sociaj konvencioj kaj al neraciaj homaj valoraĵoj. Modesteco, spirita sendependeco, sindeteno antaŭ la homaj vantecoj kaj libereco de la pensokapablo — jen la ĉefaj ŝlosiloj al bona vivo.

Epikteto naskiĝis en la mezo de la unua jarcento post Kristo. Li estis sklavo en Romo, kaj alprenis la instruojn de la stoika skolo. Laŭ stoikismo, homoj devas vivi harmonie kun la naturo, do kun si mem, kun la homoj kaj kun la universo. Ili pensis, ke la universon regas racio ("logos"), nome ia dia principo ĉiea.

→

KONDOLENCE

# Unu plia membro adiaŭas nin

**Etevaldo de Souza Pereira** forpasis la 28-an de februaro 2024. Li estis aktiva kunlaboranto en la spiritisma movado de la ŝtato Sanpaŭlo, kadre de la organizo USE (Unuiĝintaj Spiritismaj Societoj), kie li deĵoris dum pluraj jaroj en ĝia librejo kaj biblioteko Fonte de Luz (Fonto el Lumo).

Li estis fidela membro de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (EASP) kaj dum kelkaj jaroj mem deĵoris unu fojon semajne en ĝia sidejo. Kunlaborema kaj afabla homo, li plurfoje trovis lokon por la okazigo de la loka evento ERUSP (Esperanto-Renkontiĝo de la Urbo Sanpaŭlo), organizata de EASP.

Al la bonkora amiko nian sopiron kaj dankemon.


Etevaldo de Souza Pereira (1937 - 2024)

## Daŭrigo de la antaŭa paĝo: *Eterne furora libro*

Venis momento, kiam Epikteto akiris sian liberecon, sed devis forlasi Romon pro malpermeso al filozofoj. Multaj fakuloj opinias, ke li estis religiema kaj iamaniere antaŭulo de kristanaj ideoj.

La Esperanta versio de lia "Manlibro" estas flua, agrable legebla teksto. Dankon al la tradukinto Berveling kaj al la eldoninto, pro tiu bela kontribuo al nia literaturo.

**PSViana**

# Lingvaj Respondoj

de Francisco Wechsler



**Demando**

Multaj Esperantistoj dubas pri la uzado de la participo en la jenaj frazoj: *Mi vidis lin atendante la omnibuson. Mi vidis lin atendantan la omnibuson. Mi vidis lin atendanta la omnibuson.* Bonvolu klarigi la diferencon.

**Respondo**

Koncize dirite, ĉiu el la tri ekzemploj esprimas malsaman aferon, nome:

*Mi vidis lin **atendantE** la omnibuson = Atendante la omnibuson, mi vidis lin = Dum mi atendis la omnibuson, mi vidis lin.*

*Mi vidis lin **atendantAN** la omnibuson = Mi vidis lin (tiun homon), kiu atendas la omnibuson.*

*Mi vidis lin **atendantA** la omnibuson = Mi vidis, ke li atendas la omnibuson.*

La baza principo por la unua ekzemplo konsistas en tio, ke E-finaĵa participo devas ĉiam rilati al la subjekto de la ĉeffrazo, neniam al objekto. Tial en la citita ekzemplo la atendadon faris mi, kaj dumtempe mi vidis lin.

Konsideru la jenajn du ekzemplojn:

*Klopodante solvi problemon, mi ekhavis kapdoloron.*

*Klopodante solvi problemon, trafis min kapdoloro.*

La unua ekzemplo estas ĝusta, ĉar la participo ja rilatas al la subjekto (mi) de la ĉeffrazo. Sed la dua ekzemplo estas erara, ĉar la participo ne rilatas

(Daŭrigota sur la paĝo 24)

# Nekonscienca sento

Riĉa flaŭro premias sindonemajn laboristojn pri abelbredado, elverŝas nektaron el pluraj floroj dum sezono en produktiva periodo... Tamen Simon, abelbredisto en bieno “Blua Arbaro” scias el universala saĝo ke la homa specio trairadas vojon de “bono kaj malbono” dum sia ekzistado, postulantan praktikadon de pacienco kaj lernado.

Se lia laboro ĝojigas lin pro abundo da mielo kaj diversaj aliaj varoj donataj de la naturo por la feliĉo de lia familio, ankaŭ malĝojiga okazaĵo atakas lin ĉi jaron: fremdulo(j) invadis sezorge la abelbredejon kaj kaŭzis veran detruon kies konsekvenco estis ja nefacile prijuĝebla…

Simon iĝis furioza, plendante ĉiumaniere.

Danke al konsiloj de amiko, Simon akceptis trankviliĝi kaj ripari la detruitan bredejon ne suferante pro la malprofito. Post kelkaj semajnoj ĉio iĝis en ordo, preta por nova rikoltsezono. Kaj ĝi alvenis plena je promeso de abundo... Simon preparas sin por la ĝuo de riĉa laborpremio...

Tamen disreviĝan momenton la vizito al abelbredejo igis lin sperti: denove la atako al abelbredejo okazis. Denove la malprofito seniluziigas Simon kaj acidaj pensoj revenis en lian kapon. La venĝo al fiulo(j) estus necesa. “Mi serĉos la policon, kaptos la

→



rabiston kaj punos lin", pensis Simon. Denove la amiko intervenis pacigante nian aktoron konsilante al li forlasi la laboron en "Blua Arbaro" kies bienisto ne kapablas zorgi pri siaj propraĵoj.

Simon, akceptante la konsilon de sia amiko, ĉesigis la laboron en tiu bieno.

Tri jarojn post la raportita evento, Simon, partoprenante en ronda konversacio kune kun kelkaj amikoj, spertis dolorigan sciigon fare de unu el la rondĉeestantoj: "Kara Simon, mi informas al vi ke la fiulo, kiu ĝenis vin pri la malprofitoj ene de Blua Arbaro estas konato via... li estas Jonas..." Terure: kvazaŭ ŝtono falis sur Simon, li preskaŭ svenis... Fakte, Jonas estis konato lia... Simon konfesis al mi, ke ekde tiu sciigo naskiĝis en lia animo suferiga rimorso: Jonas estis patro de tri knabinoj, kies patrino lasis la infanojn sub la zorgo kaj protekto de la edzo, tiu ĉi penige laboradis en plantejo de tomatoj, travivis sinsekvajn ondojn de suferigaj bazaj necesoj por venki la malfacilaĵojn de la vivo... Simon dum longa tempo suferis pro la antaŭa sento de venĝo al simpla homo, krom la manko de kunsentemo al proksimulo...

**Valdemir Moreira**

## Daŭrigo de la paĝo 22

(Lingvaj Respondoj de Francisco Wechsler)

al la subjekto (kapdoloro) de la ĉef-frazo. Tiu frazo efektive signifas, ke la kapdoloro klopodis solvi problemon kaj dume trafis min, kio estas sensenca.

En la dua ekzemplo, la A-finaĵa participo rilatas al la objekto de la ĉef-frazo, kaj efektive enkondukas novan frazon. En la tria ekzemplo, temas pri perverba priskribo de la objekto (objekta predikativo), alivorte, pri la stato (staranta), en kiu mi vidis lin; tial la participo ne ricevas N-finaĵon, ĉar temas pri predikativo, ne objekto. La diferenco inter la du lastaj ekzemploj estas malgranda, tamen reala kaj grava.

# Esperanto estas mia grundo

Gustavo Gayer kaj Marcel van Hattem, ambaŭ deputitoj, antaŭ nelonge, prelegis en la Eŭropa Parlamento kaj en la Usona Parlamento, respektive, per la angla lingvo. Mi aplaŭdis ilin pro la tradukoj, kiujn poste mi legis.

Ankaŭ Rotary Internacia kaj Lions Internacia uzas precipe la anglan lingvon, krom aliaj lingvoj pro la diverseco de landoj, kiuj integriĝas en tiuj ĉi organizoj. En la brazila rotaria medio neniu parolas angle, sed portugale. Ĉiuj dokumentoj estas tradukitaj al la portugala lingvo.

UN – Organizo de Unuiĝitaj Nacioj uzas ses lingvojn por siaj komunikadoj.

En Israelo la oficialaj lingvoj estas la araba kaj la hebrea, sed oni scias, ke la angla lingvo estas uzata vaste.

Ĝis la komenco de pasinta jarcento la internacia lingvo, la lingvo de kultura mondo, estis la Franca. Sed dum antaŭaj jarcentoj la latina lingvo regis la mondon en la Romia Imperio, ekde 753 a.K. ĝis 476 p.K. Poste, diversaj lingvoj luktis komerce por firmigi sin inter la popoloj.

Hodiaŭ la lingvo de la politikaj, komercaj, turismaj, artaj kaj sciencaj aferoj estas la angla lingvo. Sed, ĉu ĝi estas la estonta lingvo? Hodiaŭ oni pensas, ke la ĉina Lingvo estas la estonta komerca lingvo. Ĉu vere?

Mi ne scias pri la estonteco. Mi scias, ke miaj plej karaj geamikoj estas esperantistoj, miaj ekzempluloj estas esperantistoj, mia Rotaria Klubo uzas Esperanton! Do, mi uzas mian ĉiutagan lingvon, la portugalan, kaj mia dua lingvo estas Esperanto! Mia kultura grundo estas Esperanto! Nia kara Esperanto montras al ni fratan kaj kleran estontecon, kiam la koroj ne travivas perforton, antaŭjuĝojn, diktaturojn, sed respekton, fratecon, liberecon! Finfine, homaranan vivon!

**João Otávio Veiga Rodrigues**

# 16º Congresso Paulista de Esperanto

## Paulínia/SP 14 -15 set 2024

**Tema**
A chama do Esperanto



**Local**
Escola Vitor Szczepanski e Souza Silva
(antigo Supletivo)

**Endereço**
Rua Padre José de Anchieta, 121

**Realização**

easp
Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

**Apoio**

Cultura Esperantista
& Ecobrinquedoteca

Mais informações: **easp.org.br/paulinia2024**